



Esperanto
Societo
Frankfurto



Esperanto-Informilo



Foto: Christiaan Kooyman, 26. Dezember 2005, publika havaĵo, [https://de.wikipedia.org/wiki/Ibis_\(Ovid\)#/media/Datei:Sacred_ibis.jpg](https://de.wikipedia.org/wiki/Ibis_(Ovid)#/media/Datei:Sacred_ibis.jpg)

Mesaĝo de la prezidanto:

La Ibiso estas konsiderata kiel birdo kun troa hipokriteco kaj flatado. Tiu estas esprimita en malnova libro **“Libellus Novus politicus emblematicus civitatum”**, kie oni trovas paĝon kun Ibiso en la malfono kaj en la fono oni vidas la Ronneburgon, kiun ni vizitos venontsemajnfine. La temo flatado estiĝas ĉiam pli aktuala, ĉar en nia individualisma tempo ni ĉiuj provas iel elturniĝi kaj senpripense uzas flatadon kaj hipokriton, do ne ĉiam kaj ĉiel insistas aŭ defendas niajn starpunktojn, kiam estus malavantaĝe por nia kariero.

Ĝuu la legadon,
G. Hennemann, 30-an de junio 2025

Julio-Aŭgusto

2025

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Raporto
- Lasta paĝo

Kolofono:

Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.

c/o Georg Hennemann
Rehgartenstrasse 16
35683 Dillenburg
Tel.: 02771 8196614

Bankverbindung / bankkonto:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: BE92 9051 1007 7223
BIC: TRWIBEB1XXX
bei: Wise, Belgien

Jahresbeitrag / jarkotizo:

ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

Unua mardo

La 1-an de julio 2025

ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zomo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Dua mardo

La 8-an de julio 2025

ekde la 19-a horo: Interna babilado per Zomo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Tria mardo

Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 15. Juli, 2025

Mardo, la 15-an de julio, 2025

18:30 h

Sprachrunde

Lingva Rondo

""

R. Pflüger

19:30 h

Vortrag

Prelego

„Giftmülldeponien

- Deponejo de toksaj rubaĵoj”

G. Hennemann

Mardo, la 22-an de julio, 7pm

ekde la 19-a horo: „Senprograma samideana babila renkontiĝo“

Stattcafé, Gremppstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm en Frankfurt je Majno

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745>,

https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg

Anoncoj:

- 05.7.25 12:00 Uhr Ekskurso al kastelo Ronneburg en Main-Kinzig distrikto.
Ni renkontighos tagmeze 11:50 a.m. antaŭ la biletvendejo, rigardu suben por pliaj detaloj
- 28.7. - 17.8.25 Ferioj Saalbau MÜZ Schönhof

Ausflug zur Ronneburg

Ni renkontiĝas je la 11:50 a.m. ĉe la biletvendejo de la muzeo. La muzeo malfermiĝas je la 11a. La enirprezo kostas 7 €, kaj la rondgvado por la tuta grupo kostas 27 €. La rondgvado daŭras unu horon. Se vi deziras, vi povas fari rondgvadon tra la muzeo antaŭ la rondgvado. Estas kelkaj ŝtupoj interne de la muzeo. Tablo estas rezervita en la manĝoĉambro ekde la 13:15. La manĝoĉambro estas atingebla per larĝa ligna ŝtuparo kun balustrado; estas ĉirkaŭ dudek ŝtupoj. La manĝo de la pasinta dimanĉo estis multekosta, sed bona kaj abunda. La menuo estas havebla interrete. Mi kredas, ke ni povas trinki kafon en la korto de la kastelo. Estas ĉirkaŭ dek kukoj por elekti. Mi ne rezervis tablon por kafo, ĉar ni ankoraŭ ne scias kiam ni volas trinki ĝin, kaj ĉar eble ne ĉiuj estos tie samtempe. Inter la tagmanĝo kaj la kafo, vi povas etendi viajn kruojn en la proksima arbaro aŭ fari pli longan promenadon. Post la kafo, vi eĉ havos tempon por migrado. Mi prizorgos la itinero proponojn poste. Laŭ la anonctabulo, glisparaŝuta kurso okazas ĉiun sabaton je la 9a horo matene. Se vi volas spekti la pilotojn dum iom da tempo, bonvolu kunporti faldseĝon. Estas subĉielaj naĝejoj en Büdingen kaj Langenselbold.

Wir treffen uns um 11.50 Uhr an der Museumskasse. Das Museum öffnet um 11 Uhr. Der Eintritt kostet 7.-€, die Führung für die ganze Gruppe 27.-€. Die Führung dauert eine Stunde.

Wer will, kann vor der Führung schon einen Rundgang durch das Museum machen. Im Museum gibt es ein paar Stufen. Ab 13.15 Uhr ist im Speisesaal ein Tisch reserviert. Den Speisesaal erreicht man über eine breite Holzterrasse mit Geländer, es sind etwa zwanzig Stufen. Das Essen letzten Sonntag war teuer, aber gut und reichlich. Die Speisekarte steht im Internet. Ich denke, Kaffee trinken können wir im Burghof. Es gibt ungefähr zehn Torten zur Auswahl. Für den Kaffee habe ich keinen Tisch reserviert, weil wir noch nicht wissen, wann wir Kaffee trinken wollen, und weil vielleicht auch nicht alle gleichzeitig da sind. Zwischen Mittagessen und Kaffee kann man sich in unmittelbarer Nähe im Wald die Füße vertreten oder einen längeren Spaziergang machen. Nach dem Kaffee hat man sogar Zeit für eine Wanderung.

Um Streckenvorschläge kümmere ich mich noch. Laut Anschlag findet jeden Samstag um 9 Uhr ein Gleitschirmkurs statt. Wer den Fliegern länger zuschauen will, sollt sich möglichst einen Klappstuhl mitbringen. In Büdingen und in Langenselbold gibt es ein Freibad.

Direktoj: Prenu la elirejon A45 ĉe Hammersbach, sekvu la ŝildon al Marköbel, poste sekvu la ŝildon al Ronneburg. En Hüttengesäß, turnu maldekstren de la ĉefstrato. Ĉe la trafikcirklo, prenu la lastan elirejon direkte al Büdingen. Sekvu la brunan ŝildon al Ronneburg. Prenu la elirejon A66 ĉe Langenselbold, turnu maldekstren ĉe la trafiklumoj, kaj daŭrigu tra Langenselbold direkte al Hüttengesäß. Antaŭ Hüttengesäß, sago montras direkte al Ronneburg. Ĉe la sekva trafikcirklo, iru rekte direkte al Büdingen. Sekvu la brunan ŝildon al Ronneburg. De Roßdort: Evitu preni la itineron Ostheim - Marköbel se eble. La ĉefstrato de Marköbel estas fermita. Parkado: Vi eniras tra ia konstruordego. Daŭrigu laŭ la pavimita pado al la budo kun la kornoj. Turnu dekstren antaŭ ĝi.

Gundhild Schäfer

Anfahrt: Auf der A 45 bei Hammersbach raus, dem Schild nach Marköbel folgen, dann dem Schild nach Ronneburg folgen. In Hüttengesäß von der abbiegenden Vorfahrtsstraße weg nach links. Beim Kreisel die letzte Ausfahrt Richtung Büdingen. Zur Ronneburg dem braunen Schild folgen. Auf der A 66 bei Langenselbold raus, an der Ampel links, durch Langenselbold durch Richtung Hüttengesäß. Vor Hüttengesäß zeigt schon ein Pfeil Richtung Ronneburg. Am darauf folgenden Kreisel geradeaus Richtung Büdingen. Zur Ronneburg dem braunen Schild folgen. Von Roßdort aus: Möglichst nicht die Strecke Ostheim – Marköbel fahren. Die Marköbler Hauptstraße ist gesperrt. Parken: Man kommt durch eine Art Baugatter. Auf dem asphaltierten Weg weiter bis zu der Bude mit dem Geweih. Davor nach rechts.

Gundhild Schäfer



La elstara foto : (de G. Hennemann)



fonto: "Libellus Novus politicus emblematicus civitatum", EO: "Nova politik-simbola libro de ŝtatoj", germane: "Ein neues politisch-symbolisches Buch der Staaten".

"Dulcia verba facit palpo at sunt mixta veneno, Ibis ut ore parit, pulchra sed ova mala."

Tiun latinan tekston mi tradukis tielmaniere:

"Li parolas dolĉajn vortojn per tuŝo, sed ili estas miksitaj kun veneno.

Simile al ibiso, li demetas belajn sed malbonajn ovojn."

Germane: "Er macht süße Worte mit seiner Berührung, aber sie sind mit Gift vermisch.

Wie ein Ibis legt er schöne, aber schlechte Eier."

<u>La vulpovosto povas bone flati</u>	Same kiel la ibiso tra sia gorgo
<u>Sed ĝiaj vortoj estas plenaj de veneno</u>	demetas ovojn, kiuj kaŭzas morton.

Der Fuchsschwentzer kan schmetzen wohl	Gleich wie der Ibis durch sein Rachen
Sein Wort aber seind Giftes voll	legt Eier, so den Todt ursachn.

"La Ibis (la titolo sur multaj latinaj manuskriptoj estas ankaŭ *In Ibin*, germane "Gegen Ibis"; ĉar la vorto Ibis foje havas inan genron en la latina, ĝi ankaŭ foje havas inan genron en la germana, t.e. die Ibis) estas malbenpoemo de la romia poeto Ovidio, kiun li verŝajne verkis ĉirkaŭ la jaro 8 p.K. tuj komence de sia ekzilo en Tomis ĉe la Nigra Maro.

Samtempe, la Ibisio estis konsiderata la birdo kiu purigis siajn intestojn plenigante sian bekon per akvo, kio asociigis ĝin kun troa hipokriteco kaj flatado.”

[https://www.wikiwand.com/de/articles/Ibis_\(Ovid\)](https://www.wikiwand.com/de/articles/Ibis_(Ovid))

Kial la aŭtoroj de tiu malnova libro ĝuste prenis kiel fonon de la Ronneburg por esprimi la temon hipokritecon kaj flatadon mi ne scias, sed estus interesa sperto scii pli pri iliaj elektokriterioj.

Ligiloj:

https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/1/13/Meisner_Kieser_Burg_Ronneburg_1631.jpg

<https://digi.ub.uni-heidelberg.de/diglit/meisner1678bd3/168/scroll>

https://proverbs_de.de-academic.com/6286/Fuchsschw%C3%A4nzer



Eseo: Kiu kontraŭas la Fundamenton de Esperanto?

de U. Fellmann

1 - enkonduko

Eble vi iam aŭdis - aŭ mem diris - la frazeton "tio estas kontraŭ-Fundamenta!" Mi mem ofte aŭdis tion, ekzemple kiam mi uzis la seksneŭtralan personan pronomon "ri", aŭ la objektindikan prepozicion "na" antaŭ personaj nomoj. Mi faras tion por eviti aplikon de la n-finaĵo kaj tiel ŝanĝi la nomon, kaj por eviti tute ellasi objektindikon, kion multaj Esperantistoj en tiu okazo faras.

Mi trovis tiun diron - ke vorto estas kontraŭfundamenta, ĉar ĝi ne estas en la Fundamento de Esperanto - ofte stranga, ĉar la homoj, kiuj diris tion, ĉiuj mem uzas daŭre vortojn, kiuj ne aperas en la Fundamento. La plej multaj ne uzas la landnoman sufikson "-uj", kiu ja estas Fundamenta, anstataŭe uzas la "i", dirante Francio, Svisio, ktp. kvankam tiu uzo de la i ne estas Fundamenta. Ili kutime ankaŭ evitas la Fundamentan literon ĥ, kaj anstataŭ diri "ĥoro" ili diras la novinventitan "koruso", anstataŭ "teĥniko" ili diras "tekniko", ktp.

Stranga afero, mi pensis. Zamenhof, kiu ja volis, ke oni kreu novajn radikojn por ke la lingvo povu esprimi ĉion, mem daŭre kreis kaj uzis multegajn vortojn, kiuj ne estis en la Fundamento (kiun li skribis en 1904, kaj lasis oficialigi per la Esperantistoj dum la UK en 1905). Li faris tion plejparte por traduki literaturon, kaj li alvokis aliulojn por krei fakvortarojn.

2 - analizo

Sed kiel oni povus do difini kontraŭfundamentecon?

Mi provis sisteme difini la eblojn: tio estas kontraŭ-Fundamenta, kio...

1. ne estas en la Fundamento de 1905. Ekz-e la vortoj plaĝo, tajpi, telefono, firmao, Hindujo.

2. estas forme en la Fundamento, sed gramatike malĝuste derivita. Ekz-e uzi la vorton produkto en la senco de produktaĵo.

3. estas forme en la Fundamento, sed alie uzata. Ekz-e, uzi la vorton "kompanio" en la senco de "akompanaro". Aŭ uzi la vorton "ĝi" kontraŭ siaj tradukoj kiel seksneŭtralan personan pronomon por homoj.

4. estas forme en la Fundamento, sed nur alie uzata, la originala signifo malpermesata. Ekz-e, uzi la vorton "kompanio" nur en la senco de "akompanaro" kaj malpravigi la sencon "firmao". Aŭ uzi la vorton "ĝi" ekskluzive kiel seksneŭtralan personan pronomon por homoj.

5. ne estas en la Fundamento, sed havas la saman signifon kiel Fundamenta radiko jam havas, do, sinonimo al Fundamenta radiko, aŭ al vorto, kiu egalas signife al vorto farita el Fundamentaj radikoj. Ekz-e, ekspliki (por Fundamenta klarigi), hospitalo (por malsanulejo).

6. estas kiel 5., sed samtempe estas barita la uzo de la Fundamenta radiko. Ekz-e, uzi la "i" kiel landnoma derivilo, kaj bari la "uj" en tiu senco (kiel dum jardekoj faris la gazeto Monato). Diri koruso anstataŭ ĥoro, uzi ĉiam k anstataŭ ĥ, kaj bari la uzon de la ĥ en publikaĵoj.

7. nek estas en la Fundamento nek havas signifon, kiun Fundamenta radiko jam esprimas. Ekz-e la vortoj plaĝo, ri, tajpi, telefono, firmao, Hindujo.

8. estas mallongigo de Fundamenta radiko, ekz-e aŭto (por aŭtomobilo).

9. estas metafore uzata. Ekz-e la vorto "ondo" kiel en "La Ondo de Esperanto", aŭ "krokodilo", kiel en "ne krokodilu!"

10. estas ... (via propra aldonata variaĵo!).

3 - kion opiniis Zamenhof?

Por pli bone kompreni la sintenon de Zamenhof rilate la temo de vortkreado kaj Fundamenteco, oni ja legu la antaŭparolon, kiun li skribis por la Fundamento. (Tio miaopinie estas nepre leginda teksto de Zamĉjo!)

Mi mem komprenis lin resume tiel: Ni kreu novajn radikojn tiam, kiam ili estas bezonataj kajaŭ utilaj, ĉar ili (pli) bone esprimas ion, kion oni ĝisnune ne povis (aŭ nur malbone povis) esprimi.

Sed kio pri la neŝanĝblo de la Fundamento? La neŝanĝblo de la Fundamento konsistas miakomprene el tio, ke ĉio, kio estas parto de ĝi, por ĉiam uzeblas.

Kion tio signifas? Miakomprene tion: eĉ se iam Eo-vortaroj havas centmil radikojn ne troveblajn en la Fundamento, agnoskitaj de la Akademio - se iu persono uzas radikojn el la Fundamento, en la senco, kiel klarigite kaj tradukite en ĝi - tio estas ĝusta, ne kritikebla Esperanto!

4 - finiĝo

Anstataŭ nian kutiman enigmon, vi ĉi-foje ricevas demandon: kio estas via opinio pri la afero?

- a) Kiujn de tiuj naŭ (aŭ pli da) punktoj vi juĝas esti kontraŭfundamentaj,
- b) kiujn vi vidas kiel nur nefundamentaj,
- c) kiujn tute kongruaj al la Fundamento?

Venontfoje mi prezentos la rezultojn! (Kune kun mia propra persona prijuĝaro).

Solvojn sendu kiel kutime al mia retpoŝta adreso ulrich.fellmann@gmx.de.

Kromnoto pri la du Unuŝtonuloj:

Eble interesas vin legi iom pri Leopold, kiu fondis ja la unuan Esperantoklubon de la mondo, kiu tamen antaŭe estis... Volapük-klubo!

Jen ligilo al Wikipedia artikolo pri li:

https://eo.m.wikipedia.org/wiki/Leopold_Einstein

Albert neniam lernis Esperanton, sed li ŝajnis esti simpatiinta al la internacia lingvo. Du jarojn post la ricevo de la Nobelpremio pri Fiziko, li akceptis la honorprezidantecon de la 3-a SAT-Kongreso, kiu estis tiam planita okazi en Kaselo (Germanujo) en 1923.

La 14-an de junio 1923 Albert skribis al E. Lanty (germanlingve, prezentita sur retpaĝo de SAT-Amikaro, ĉi-tie tradukita versio):

"Mi konsentas, ke vi faros min honora prezidanto de via kongreso, dankas al vi por tiu pruvo de simpatio kaj deziras al via entrepreno plej bonan sukceson."

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

Du amikoj renkontras.

"Ĉu la okulooperacio sukcesis, kiun vi forigis?" -

"Ho jes, mi nun povas vidi, kiel aĝa mi vere estas."

(Inventita de Hartmut)

Proverbo de la monato (elektita de G. Hennemann)

Hodiaŭ mi volas prezenti proverbon kiu pritraktas flatadon, la titoltemo de tiu eldono.

[zam-853.01] kiu flatas al ĉiu, plaĉas al neniuj

https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/eo/vorto_flat.htm



Jan Massys (1509–1575): La hipokrituloj,
(germane: *Die Heuchler*), dekseka jarcento

Enigmoj (faritaj de Ulriko)

Solvo de la junio-esperantinformila enigmo

La enigmo komencis tiel: Vivis dum la 20-a jarcento du personoj havantaj la saman familian nomon. Ambaŭ subtenis Esperanton.

Ambaŭ estis germanoj.

Unu iĝis konata en Esperantujo, la alia iĝis eĉ konata ekster Esperantujo.

La demandoj estis:

- (1) Kiun planlingvon ili lernis komence?
- (2) Kie ili naskiĝis?
- (3) Kiel ili nomiĝis personnome?

Respondoj:

- (3) Leopold Einstein kaj Albert Einstein.
- (2) En Roth apud Nurnbergo; en Ulmo.
- (1) La unua lernis Volapukon, la dua neniun planlingvon.

Solvis la enigmon parte nur Bernhard Westerhoff. Li skribis retpoŝte:

- (3) Albert kaj Leopold Einstein (+2)
- (2) Nürnberg (+1)
- (1) Supozeble Volapük (+1)

do atingis 4 el 6 eblaj poentoj! Gratulon, Bernhard!

Nova Enigmo (vidu la lastan alineon de la eseo) Solvojn sendu kiel kutime al mia retpoŝta adreso ulrich.fellmann@gmx.de.